

LA VERDA LUPEO



Informilo de ELF/AREK


Decembro 2015

(47a jaro)

N-ro 170

Esperanto-Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ



*Karaj Ĝeamikoj!
Ni deziras al Vi feliĉan novan
jaron en sano kaj paco!!!*



La retejo de la 101a UK en NITRA prezentas tiun bildon kiel poŝtmarkon. Kaj ni ekscias, ke la logotipon kreis la rusa Esperantistino Jelena Husanova, kiu nuntempe kiel volontulino laboras en Slovakio. Ŝi gajnis la ĉefan premion en konkurso pri kongresa emblemo por la 101a UK: senpaga partopreno en la UK (kongresa kotizo kaj tranoktado). La konkurson iniciatis LKK sub gvido de Peter BALÁŽ. Partoprenis 11 personoj kun 49 proponoj. Sendube la slovakia poŝto aldonos ankaŭ landonomon kaj valoron.



Vortoj de nia prezidantino

Tre estimataj kaj kara ELF-AREK-anoj!

Vi tenas en viaj manoj la decembran LA VERDA LUPEO-n, la lastan de 2015a jaro, kaj kiel kutime, endas iel „kuntiri la fadenojn“ kaj havi ian superrigardon sur la faritaj laboroj. Ĉijare dum la 100a UK en Lillo, nia Ligo sin prezentis dum la Movada Foiro. Mi ne estis


sola, sed kun la amikoj Jean Pierre Ducloyer kaj Bert Boon, la iniciatoro

de Esperanto-Numismatika Asocio (N.B.: kiu deziras ricevi la revuon ESPERANTA NUMISMATIKO – senpage! – povas simple mesaĝi al li: bert.boon@skynet.be). Dum-kongrese aro da membroj kunvenis kaj priparolis la situacion de nia Ligo. Ekestis proponoj por pli intensa kunlaborado kaj projektoj por pli trafe diskonigi nian fak-asocion. Estis plezure tie bonvenigi malnovajn membrojn: Michel Basso kaj Stanisław Mandrak, kaj novajn: Bert Boon kaj Michael Karpati. I.a. estis propono, ke en la venontjara 101a UK, okazonta en Nitra, Slovakio, oni mendu salonon, por publika kunveno de Elf-Arek, do ne nur por la membroj. Kiam estos la momento kaj mi ekscios pri la kostoj, laŭ la buĝeto la estraro decidos pri mendo aŭ ne. Ĉijare por luado de salono kun kapacito de 60 personoj kostis 40 €: ne tiom, ĉu ne? Tiam ni povos prezenti la asocion pli taŭge kaj trafe, ankaŭ pere de projekciado de filatela materialo, per prelego pri nia historio k.a. Mi atendas jam nun viajn sugestojn.

En aprilo ĉ.j. iĝis ligano s-ro Kjell Randehed el Svedio. Pli-malpli akurate pluraj el vi pagis sian jarkotizon, sed estas ankoraŭ tempo por tiuj kiuj forgesis tion fari. Memoru, ke gravas por la plua ekzistado de niaj Ligo kaj organo via monsubteno: konsideru ke la estraro de Elf-Arek ne estas tiom postulema, ĉar finfine temas pri ĉ. 1,40 eŭroj monate! Dezirante al vi ĉiuj serenajn Kristnaskon kaj pacan 2016an Jaron,

plej sincere salutas

Elda Doerfler




Individua pm "100a UK en Lillo"



Kun suba noto: LETTRE VERTE
Iniciatis: "Esperanto France"

Kun suba noto: MONDE
Emisiis: Franca Poŝto



Kongresa bildkarto, sendita de Elda Doerfler
kun ambaŭ (individuaj) kongresaj pm-oj
kaj sube kun la kongresa glumarko

3 E-pm por la 102a Japana Esperanto-Kongreso, 2015



Eldondato: 10a oktobro 2015

Bildo: Kongresa emblemo: Historia velŝipo sur helblua fono

Nigra teksto ĉirkaŭ la cirklo kaj ruĝa teksto sub ĝi

Teksto: La 102-a Japana Esperanto-Kongreso

Sendai 10 – 12 okt. 2015

Nominaloj:

52 enoj

82 enoj (sur blua)

82 enoj (sur blanka) granda pm

**Pri la velŝipo San Juan Bautista
(„Sankta Johano la Baptisto“)**



Antaŭ 400 jaroj (1615/1616) la daimio (guberniestro) DATE Masamune sendis per tiu ŝipo delegitaron sub gvido de s-ro HASEKURA Tsunenega trans la Pacifikon al Eŭropo.

I.a. HASEKURA ricevis aŭdiencon de Papo Paŭlo la Kvina.

Rekonstruaĵo de la velŝipo nun situas en la urbo Iŝinomaki, gubernio Miyagi.

Kaj aperis poŝta stampo por la kongreso:


Urbo: SENDAI

10-12 oktobro 2015 (27. 10. 10.)

Bildo: Velŝipo San Juan Bautista

Teksto: 2015 JAPANA ESPERANTO-KONGRESO (kaj en la japana)

Informis: HARUJA Maekaŭa Ni kore dankas al vi!



Kongresa memorkoverto kun kongresa memorstampo, pejzaĝa kaj loka poŝtstampoj
Aperis ankaŭ poŝtkarto kun sama surprisaĵo


La emblemo kun verda fono

La pejzaĝa stampo montras rajdistan monumenton pri la unuokula DATE Masamune,
samurajo kaj fondinto de SENDAI. *Tion diras Google.*

La koverton sendis nia Dojeno ZIRO Suzuoki. Koran dankon al vi!
Li havas novan adreson:

ZIRO Suzuoki * 6580001 Kobe, Higashinada * Morikitamachi 6-1-1
Care House Kobe, Konan, 319 JAPAN

La 102-a Japana Esperanto-Kongreso en Sendai, 2015



Folio kun 10 grandaj ipm 82 enoj
Folio kun 20 ipm 52-enaj

Folio kun po kvin ipm 52 kaj 82 enoj
Folio kun 20 ipm 82-enaj

La kopiojn sendis HARUJA Maekaua



150a naskiĝ-datreveno de Zamenhof (Individua poŝtmarko-talono)

Eldonita: 05 04 2009

Nominalo: 0,52 € (= „1“ en la dekstra parto)

Eldonkvanto: 40 folioj (40x15 = 600 pecoj)

Koloroj: verda, blanka, ruĝa, blua

Desegnisto: Georgens Bollens

Realigo: Pieter De Wever

Bildo: Portreto de Zamenhof, urba blazono de Tienen

kaj: „La Hirundo“ (Nomo de la loka E-klubo)

Informoj senditaj de Bert Boon en aŭg. 2015. Dankon al vi!

Ofertita unuafoje en reta aŭkcio ekde majo 2015 (2.80 €)

Jen kelkaj pli frue aperintaj



2004 (Lovenio)



2002 (Tienen)

2007 (Antverpeno)




2007 (Tienen)





Salutojn el Kelmis

AMIKEJO 1908 - 2008



Nia amiko Hans Jankowski partoprenis 2008 memor-kunvenon en Kelmis okaze de la fondiĝo de la „Esperanto-ŝtato“ AMIKEJO antaŭ 100 jaroj. Lastmomente li sukcesis akiri tiun ĉi ipm kaj ĝin sendis al mi. Onidire devus ekzisti dua tia samtema ipm, sed bedaŭrinde li tiun maltrafis. En la marko videblas verda stelo kaj la teksto

AMIKEJO 1908 2008
Salutojn el Kelmis

**La E-moneroj de Kubo
memore al la UK en Havano
1990**



Averso



Reverso

1 Peso



Averso



Reverso

5 Pesos (Argenta)

1 Peso (Universala Kongreso de Esperanto)

Eldono: 1990 Speco: Cirkulanta memormonero

Pezo: 11,4 gramoj

Diametro: 30 mm Materialo: Kupro-Nikelo

Stampejo: Casa de la Moneda de Cuba

Rando: glata Formo: ronda

Valoro: 1 peso

Eldonkvanto: 6.000 ekz.

Materialo: 75% Kupro, 25% Nikelo

5 Pesos

Eldono: 1990 Pezo: 16 gramoj

Speco: Monero por kolektantoj

Stampejo: Casa de la Moneda de Cuba

Materialo: Arĝento Rando: Reliefa

Formo: Ronda Valoro: 5 Pesoj

Eldonkvanto: 6000 ekz.

Materialo: 999/1000 Arĝento



Kvankam jam pasis 25 jaroj post ĝia apero, ni tamen atentu pri ĝi. Mi ne memoras, ĉu ni jam informis pri ĝi. Eble tiutempe neniuj skribis pri tiu numis-koverta. Ĝi posedas la kongresan poŝtmarkon, kongresan utk-poŝtstampon (7.3.1990) kaj kongresan memormoneron kun valoro de unu kuba peso.

1979: Popola Respubliko Pollando

LUDWIK ZAMENHOF



1 Averso A

1 Reverso A

2 Averso B

2 Reverso B

**En sia katalogo pri medaloj de 1989 nia amiko H. Jankowski notas:
"...En la serio de memorigaj moneroj pri grandaj poloj la pola registaro
emisiis ankaŭ monerojn pri la kreinto de nia lingvo:**

Eldono A: En metaloj arĝento (30000 ekz.) kaj nikelo (500 ekz.)

Eldono B: En metaloj arĝento (3000 ekz.) kaj nikelo (500 ekz.)

**Averso de ĉiuj kvar moneroj: La pola aglo kun "1979", ĉirkaŭita de
POLSKA RZECZPOSPOLITA LUDOWA kaj: 100 zlotoj**

Pezo de la nikelaj: nekonata, malpli.

**Nek la arĝentaj, nek la nikelaj moneroj cirkulis en PL. En 1980 la prezoj
variis por la arĝentaj inter 8 – 15 usd, por la nikelaj inter 300-400 usd.
Vendataj la moneroj estis nur kontraŭ usd, ekz. ankaŭ en la UK 1987...**



La reta elŝutejo de la LKK donas jenajn klarigojn pri la emblemo en la kongresa glumarko:

Parola veziko, kiu simbolas paroladon, lingvon, Esperanton (ero de la emblemo de UEA)

- belfrido, kiu estas tipa turo en norda Francio: ĝi simbolas la urban potencon kontraste al la ŝtata kaj la eklezia potencoj (ero de la emblemo de la franca regiono Nord-Pas-de-Calais)
- mencioj "100", "1905" kaj "2015", kiuj signas la 1an kaj la 100an Universalajn Kongresojn de Esperanto
- bluo, blanko kaj ruĝo, kiuj kune simbolas Francion
- bluo kaj flavo, kiuj kune simbolas Eŭropon



Kiu konas, aŭ posedas tiun ĉi markon?

Nia nova kluba membro, s-ro BOON, sendis du markojn, en bruna kaj en helbruna, sendantaj kaj sengumaj, al Elda Doerfler. Li opinias, ke temas pri ĝis nun nekonataj glumarkoj de la 27a UK en Romo. Mezuro: 50x50



Mi scias pere de nia Jean Amouroux, ke estis planita kongresa poŝtmarko kun tia desegno, sed pro deviga ĉeesto de faŝista simbolo ne estis tolerebla por Esperanto-kongreso. Nia fama Reinhold Jensen notas en sia katalogo de 1962 sub nro 257 glumarkon por la 27a UK, en vertikala formo kun mezuro 35x57, plurkolora en flava, nigra kaj verda. Kaj duan memore al la ESPERANTISTA KROZADO kadre de la UK. En kvin kolor-variaĵoj: blua, flava, verda, ruĝa kaj viola. Mezuro: 28x42, sub n-ro 258. Desegnis ĝin la fama Lodovico Rodo.

- 101 -

Unua Serio da propagandaj markoj eldonitaj de la Itala Katedro de Esperanto

La serio enhavas 16 markojn plej parte desegnitaj de Prof. Bindo Migliorini el Venecio. Ili estas presitaj en kvin malsamaj koloroj: verda, blua, ruĝa, bruna kaj nigra. Aliaj desegnaĵoj estas pretaj. Ni petas, ke ĉiuj Esperantistoj (Katedranoj, Delegitoj, Grupoj) sendu desegnaĵojn al la Bolonja sidejo. Oni postulas nur, ke ili havu formaton 8x11.3 cent.

La prezo de la folioj (haveblaj de la Bolonja sidejo de la Katedro, Vallescura, 11) kun 16 markoj, estas jena:

10 folioj fr. 0.50 sm. 0.200
100 » » 2.50 » 1.000

Aldonu la poŝtelspezojn kaj, se bezone, tiujn de la rekomendo.

La serie contiene 16 bolli, la maggior parte disegnati gentilmente dal Prof. Bindo Migliorini di Venezia. Sono stampati in cinque differenti colori: verde, bleu, rosso, bruno e nero. Altri disegni sono pronti. Si pregano tutti gli Esperantisti (Membri della Cattedra, Delegati, Gruppi) di mandare disegni alla Sede di Bologna. Si richiede solo che essi abbiano il formato di cm. 8x11.3.

Il prezzo dei fogli (che si possono avere dalla Sede di Bologna della Cattedra di Esperanto, Vallescura 11) con 16 bolli differenti, è il seguente:

10 fogli L. 0.50

100 » » 2.50

Aggiungere le spese di posta e, se si desidera, quelle di raccomandazione.

Qui accanto diamo un saggio dei bolli.

Ni gluas tie
ĉi specime-
non de la
markoj.



GRAMATIKO DE ITALA LINGVO

LECIONO KVARDEKUNUA

Konjunkcioj

Kiel la adverboj ankaŭ la konjunkcioj estas senŝanĝaj vortoj troveblaj en vortaro: sekve pri ili sufiĉu tie ĉi la

EKZERCO

Itala teksto

1. Dio vuole che amiamo i nemici.
2. Se sarai onesto, non ingannerai nessuno, nè permetterai che col tuo consenso altri inganni.
3. Benchè nessuno mi veda, io mi aste rò dal male.
4. Per vivere è necessario lavorare o rubare.

Traduko

1. Dio volas, ke ni amu la malamikojn.
2. Se vi estas honesta, vi neniun trompos, nek vi permesos ke kun via konsento aliaj trompu.
3. Kvankam neniun min vidos, mi min detenos de la malbono.
4. Por vivadi estas necese aŭ labori aŭ ŝteli.



Verkita de Antonio de Salvo

Krom la pli famaj Bruno kaj Elio, estas ankaŭ tria Migliorini inter la pioniroj de Esperanto en Italio: Bindo Migliorini (*).

Lin citas Carlo Minnaja ĉe paĝo 75 de sia volumo *“L’Esperanto in Italia – Alla ricerca della democrazia linguistica”*, eld. Il Poligrafo, Padova 2007, naskiĝinta el la disertacio per kiu la aŭtoro, jam Profesoro pri matematika Analitiko ĉe la Universitato de Padova, akiris la magistran titolon pri Beletro ĉe la Universitato de Venezia Ca’ Foscari: la elekto de Universitato alia ol la propra estis intenco, por povi sekvi la studojn “inkognite”.

Bindo Migliorini, patro de Bruno kaj Elio, estis profesoro pri desegno. Mi aldonas paĝon de *“L’Esperanto”* 1915-8,9 de la 25a de aŭgusto-25a de septembro 1915 (precize antaŭ unu jarcento), kun la prezento de glumarko desegnita de Bindo Migliorini por reklami la rubrikon *“Esperanta sinonimaro”* de la filo Bruno.

Estas rimarkinde, ke ekzemplero de la glumarko estas algluita al la paĝo en originalo: estas kortuŝe pensi, ke la eldonisto-presisto Antonio Paolet prizorgis la manan kompletigon de la unuopaj ekzempleroj de la revuo (*ho, granda boneco de la antikvaj pioniroj!*).

(*) *Flanka noteto pri la nomo Bindo: Sankta Bindo ekzistas nur en la popola tradicio. Pro tio, en la itala ekzistas pluraj dirmanieroj, kiuj per la nomo de tiu “Sanktulo” referencas al tempo estonta, tre malproksima kaj neniam estiĝonta (iel simile al la “grekaj kalendoj”): ekzemple, formeti/ prokrasti ĝis Sankta Bindo; en Esperanto, la respondaj formuloj estas “formeti/ prokrasti ĝis la grekaj kalendoj/ la tago de Sankta Neniamo/ la trijaŭda semajno”.*



L'Esperanto


Periodico quindicinale di studio e propaganda
a cura della Cattedra Italiana di Esperanto

Lecionoj de klasikaj kaj vivantaj Lingvoj per Esperanto

ITALIA: Con copertina L. 2 Senza copertina » 1.50 Con l'app. lett. <i>Itala Animo</i> (12 Num.) » 3 Con <i>Latina Lingvo per Esperanto</i> . . » 3.50	EKSTERLANDE: Jare Sm. 1.300 Kun liter. ald. <i>Itala Animo</i> (12 num.) » 1.900 Kun <i>Latina Lingvo per Esperanto</i> » 1.900 Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista - London
---	--

Direzione ed Amministrazione presso l'editore A. Paolet - S. Vito al Tagliamento (Italia)

SI PUBBLICA IL 10 E IL 25 DI OGNI MESE



Sendita de s-ano Parrish al Otto Simon en Vieno, 3 5 1915 el Santa-Francisko

22 – 29 aŭg. 1915: 11a UK en Sankta-Francisko dum Ekspozicio Panama-Pacifika kun 163 e-istoj el 16 landoj. Organizita de E. Parrish.

Bildkarto por la 5a Amerika Esperanto-Kongreso, 1915






Unu el sep kongresaj bildkartoj pri la 100a UK, eldonitaj de "esperanto-france",
haveblaj en la kongresejo...
Senditaj de nia Elda. Dankon al vi!



En la n-ro 6a de la kongresa kuriero BELFRIDO videblis sciigo
pri eksterkongreseja vendejo kun ofertoj pri kongresaj bildkartoj,
kgr-poŝtmarkoj, flagoj k.t.p.



Slovakaj esperantistoj invitas al la 101a UK en Nitra (2016)
Eldonkvanto de la bildkarto: 250 ekz.

Feliks Timmermans, flandra amiko de Esperanto

Danke al Greta kaj Jan Torfs eblas informi pri la flandra famulo F. Timmermans. Pri li kaj pri lia "Kristnaska Triptiko", Flandra Esperanto-Ligo en jaro 1986 eldonis du poŝtkartojn.

Kristnaska Triptiko

(nederlande: Driekroningen Triptiek) estas novelo de la flandra aŭtoro Feliks Timmermans el la jaro 1923. Ĝi estis esperantigita de Eugene Paesmans kaj eldonita de Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj 1938. Reeldono aperis en 1977 fare de la E-grupo La Verda Stelo en Antverpeno.

Eugene Paesmans skribis 1938:

...Inter liaj verkoj la Kristnaska Triptiko estas juvelo pro sia naiva kaj pia priskribo. La rakonto servis kiel bazo por la teatraĵo "Kie haltis la stelo", kiu dum la Kristnaska tempo ofte estas prezentata.

La aŭtoro estas ankaŭ lerta desegnisto, kaj li por tiu ĉi eldonaĵo desegnis novan ilustraĵon por la kovrilo, kaj aldonis, kiel pruvon pri sia simpatio al Esperanto, specialan desegnaĵon, kiu montras la stelon super la staleteto de Betleĥem, kun la vortoj: "Paco per Esperanto"...


Feliks Timmermans

(naskiĝis 5an de julio 1886 en Lier, mortis 24an de januaro 1947)

Fontoj: eo.wikipedia.org/wiki/timmermans



Jan kaj Greta Torfs per pk (1986)

Dankon al vi!





Ilustraĵo el "Kristnaska Triptiko"
de Felix Timmermans (1886 - 1947)



La du poŝtkartoj „Kristnaska Triptiko“ (1986)



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

Prezidantino:

S-ino Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1

IT-34138 TRIESTE

>testudo.ts@gmail.com<

Jen mia bankokonto:

IBAN: IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX.

Por: Elda Doerfler

UEA-konto:

ELF/AREK = Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti nian prezidantinon.



La ELF/AREK-poŝtmarkoj
estas ankoraŭ
haveblaj ĉe nia prezidantino.

Adresŝanĝo: ZIRO Suzuoki

6580001 Kobe, Higashinada * Morikitamachi 6-1-1

Care House Kobe, Konan, 319 JAPAN (Lia e-mail-adreso ne plu funkcias)



82a ITALA KONGRESO

**81a INTERNACIA KONGRESO
DE BLINDAJ
ESPERANTISTOJ**

22. 8. 2015 en San Benedetto del Tronto